Numero 10. Decembro 1918.

# LA PROGRESO

Bohema organo esperantista ✉ Časopis českých esperantistů

Aperas monate. Jara abono K 4.50 (por 10 numeroj). — Redakcio: Plzeň, Radyňská ul. 10. — Administrejo: Fr. Kavan, komercisto, Plzeň, Poděbradova tř. 6. — Konto de la Poŝta ŝparkaso no. 169.352. — Telefono: 732./VI. — La manuskriptojn oni ne resendas.

J. Jirout, redaktoro de Omladina:

## NIAJ ESTONTAJ DEVOJ.

Antaŭ unu jaro ni estis ankoraŭ plenaj de timo. Estis jam tempo post la aperigo de la manifesto de bohemaj verkistoj eĉ deklaro de niaj deputitoj sur parlamenta tribuno el la lasta majo 1917, sincere ni estis malfermintaj niajn korojn al la tuta mondo, ni klare estis dirintaj kion ni postulas, sed ni ne sciis kiagrade estos plenumitaj niaj plej sanktaj kaj justaj postuloj. Por niaj celoj ni volis batali, ni volis oferi vivojn eĉ ekzistojn. Kaj ankaŭ ni batalis. Batalis kaj laboris la niaj ekster la landlimoj, politikistoj eĉ soldatoj, batalis kaj laboris eĉ ni hejme, certe nur laŭ la ebleco de samtempaj cirkonstancoj. Sed ĝi estis batalo honora kaj nia venko estas tial meritita. Kvankam el la flanko de iama Aŭstrio oni uzadis kontraŭ ni ĉiujn eblajn rimedojn, tamen ni, sciante pri nia rajto, uzis nek unu malhonoran batalilon, nek unu mensogan vorton. Kaj eble nur pro tio ni venkis!

Hodiaŭ fine ni povas proklami, ke ni estas ĉe nia celo, ke la Ĉeĥoslovaka ŝtato estas afero preta. Ĝi estas jam aprobita de la plej gravaj ŝtatoj mondaj, ĝi eniras en la internacian mondan politikon, kaj verŝimile la porpaca konferenco favore plenumos ankoraŭ kelke da niaj malĉefaj postuloj. Ni elektis tiun ŝtatan formon, kiu plej bone respondas al la tradicio de nia nacio kaj al ĝia strukturo, nome la formon respublikan. Ni jam havas nian prezidanton eĉ konstituitan registaron, mallonge dirite, ni jam estas ordigita ŝtato, kiu volas eniri en la familion de aliaj liberaj ŝtatoj.

Sed per tio por ni devenas novaj devoj. Se ni estis laborintaj por kreo de la ŝtato, tiom pli ni devas zorgi por ĝia konservo.

Josef Jirout, redaktor Omladiny:

## NAŠE PŘÍŠTÍ POVINNOSTI.

Ještě před rokem byli jsme plni obav. Měli jsme sice již za sebou projev českých spisovatelů a prohlášení našich poslanců na půdě parlamentní z posledního května 1917, otevřeli jsme upřímně celému světu svá srdce, řekli jsme otevřeně co chceme, ale nevěděli, do jaké míry naše nejsvětější a spravedlivé požadavky budou splněny. Pro naše cíle chtěli jsme bojovati, chtěli jsme nasaditi životy i existence. A také jsme bojovali. Bojovali a pracovali naši za hranicemi, politikové i vojáci, bojovali a pracovali jsme my i doma, ovšem pokud za daných poměrů bylo jen možno. Ale byl to boj čestný a vítězství naše je proto zasloužené. Ač proti nám se strany bývalého Rakouska používalo se všech možných prostředků, přece my, vědomi jsouce svého práva, jediné špatné zbraně, jediného slova lživého jsme neužili. A snad jen proto jsme zvítězili!

Dnes konečně můžeme prohlásiti, že jsme u svého cíle, že československý stát je hotovou věcí. Je dnes již uznán nejpřednějšími státy světovými, vstupuje do mezinárodní světové politiky a snad ještě mírová konference vyřídí některé naše menší požadavky. Vybrali jsme si takovou státní formu, která nejlépe odpovídá tradici našeho národa i jeho složení, totiž formu republikánskou. Máme již svého presidenta, máme ustavenou vládu, zkrátka jsme spořádaným již státem, který chce vstoupiti do rodiny ostatních svobodných národů.

Ale tím nám vznikají nové povinnosti. Jestliže jsme pracovali pro utvoření státu,

Batalakiri ion ofte ne estas tiel malfacile, kiel konservi la akiritajn sukcesojn. Kaj tial per ĉiuj fortoj ni devas peni, ke la ritaloj de la juna respubliko transiru el la provizoraj al definitivaj, por tiel ebligi la plenumon de ĉiuj taskoj, kiuj atendas nian ŝtaton.

Unu el plej gravaj similaj devoj estas la problemo de edukado en la respubliko. La prezidanto Masaryk mem konstatis la necesecon de solvado de tiu ĉi problemo, kiam li en sia komuniko parolis pri transformo de nacia eduko. Kaj ĝi estas vero, kiun oni ne povas kaŝi. Nun ni havas respublikon, ni estas respublikanoj, ni faris ŝtatan renverson, sed en tiu momento aperas la devo, transformiĝi interne en la animoj kaj pensoj, mallonge dirite, esti respublikanoj ne nur ekstere, sed eĉ interne. Liberiĝi de ĉiuj malnoviĝintaj antaŭjuĝoj, kiujn ni alportis el la malnova Aŭstrio, kaj esti veraj homoj, kiujn bezonas ne nur nia respubliko, sed eĉ la nuna tutmonda situacio. Sed tiu ĉi anima transformo ne estas pensebla eĉ ebla sen persista, celoscia laboro. Laboro, laboro kaj ree laboro devas esti nia devizo. Cetere per ĝi ni estas devoligataj ne nur al ni mem kaj al nia prezidanto, kiu estas viro de ago kaj laboro, sed eĉ al ĉiuj konatoj kaj nekonatoj, kiuj laboris por efektiviĝo de nia memstareco. Per laboro ni venkis, per laboro ni daŭros. Kiam Napoleono haltis antaŭ la piramidoj en Egiptujo, li ekvokis: »Soldatoj, tri miljaroj rigardas vin!« Kaj nin hodiaŭ rigardas la tuta bohema historio, kaj ĝi nin iam juĝos. Kaj nia devo estas ekkompreni la nunan grandan epokon, por konsciiĝi pri la grandaj taskoj, kiuj nin atendas. Nun ne estas jam necese morti por nia ideo, sed kontraŭe, vivi kaj krei. Se ni iros la rektan vojon, sur kiun starigis nin la mondaj okazintaĵoj, en niaj demokrataj tradicioj, tiam ni ne devas timi la juĝon de estonta historio, de tiu justa juĝisto!

musíme tím více starati se o jeho udržení. Vybojovat něco není často tak nesnadno, jako dobyté úspěchy si zachovati. A proto všecky svoje síly musíme vynaložiti k tomu, aby poměry v mladé republice přešly z provisorních k definitivním, aby tak mohly se uskutečniti všecky úkoly, které náš stát očekávají.

Jednou z nejdůležitějších takových povinností je otázka výchovy v republice. Sám president Masaryk uznal potřebu luštění této otázky, když v poselství svém mluvil o převýchově národa. A to je pravda, která se nedá zastírati. My máme teď republiku, jsme republikány na venek, provedli jsme převrat státní, ale tím okamžikem nastává nám povinnost, přeroditi se uvnitř v duších a myslích, zkrátka býti republikány jak zevnějšími, tak i vnitřními. Osvobodili jsme se od všech zastaralých předsudků, které jsme přinesli s sebou ze starého Rakouska a býti celými, opravdovými lidmi, jakých vyžaduje nejen naše republika, ale i dnešní světová situace. Ale tento duševní přerod není myslitelným ani možným bez vytrvalé cílevědomé práce. Práce, práce a zase práce, musí býti našim heslem. Ostatně tou jsme povinni nejen sobě samým a našemu presidentu, který je mužem činu a práce, ale také všem těm známým i neznámým, kteří pracovali pro uskutečnění naší samostatnosti. Prací jsme zvítězili, prací se též udržíme. Napoleon, když stanul se svým vojskem před pyramidami v Egyptě, zvolal: »Vojáci, tři tisíce let se dívá na vás!« A na nás dnes se dívají celé české dějny a ty nás budou jednou souditi. A je na nás, abychom pochopili veliké úkoly, které nás očekávají. Dnes není nám třeba pro naši myšlenku již umírati, ale naopak žíti a tvořiti. Půjdeme-li přímo cestou, na kterou nás postavily světové události v našich demokratických tradicích, pak nemusíme se obávati soudu budoucích dějin, tohoto soudce spravedlivého!

---

Ant. Janalíková:

# MIA MALLIBERIGO

## en la jaro 1915.

(Fino.)

La duan tagon kreskis nia nombro per sinjorino F., kiu estis alveturigita en nian ĉefurbon kun sia edzo estinte antaŭe dum tri semajnoj jam en sia hejmurbo Znojmo arestita. Oni devas scii pri la vivo de Bohemoj inter la Germanoj, kie la lastaj etas en plimulto, se oni volas kompreni la suferojn kaj turmentojn de niaj samnaciuloj. Sed ŝi kuraĝe ĉion suferis, nur la rememoro pri la malsaneta edzo, kiu estis arestita en alia malliberejo de nia ĉefurbo, kaj pri grave malsana filo. kiu restis sub inspekto de du pli junaj gefratoj, turmen-

tis ŝin treege. La plej maljuna filo mortis antaŭ ne longe je ftizo, la dua estas kaptita de Rusoj sed tiu tria, malsana? — Post kelkaj semajnoj, kiam ni ambaŭ estis jam liberlasitaj, mi ricevis la mortateston de ŝia filo, dume ŝia edzo vivis ankoraŭ en malliberejo.

Kvazaŭ freŝeco kaj printempo penetrus en malliberejon, kiam venis la blondhara movelasta B. Ŝi venis kun ploroj, sed baldaŭ ŝi kvietiĝis kaj konatiĝis kun aliaj. Ŝi sciis ĉiujn belajn slovakajn nacionalkantojn, produkis sin per sokola gimnastiko kaj danco kaj ĉiuj amis ŝin kaj kial ŝi venis ĉi tien? Ŝi estis iomete frandema kaj formanĝis al germana kuiristino, kun kiu ŝi en sama domo servis, membraneton de lakto. Fariĝis disputo kaj la kuiristino denunciis ŝin pro iu favora vorto al Rusoj, kiun ŝi unufoje ŝerce diris. Sed daŭris eĉ ne dekkvar tagoj, kaj la slovaka (el suda Moravio) birdeto estis liberlasita kaj anstataŭita per ruĝvanga gracia knabino W. el sama urbo, kiu kuraĝis al sia amantosoldato skribi kelkajn vortojn pri nunaj altaj prezoj de ĉiuj bezonaĵoj. Sed ankaŭ ŝi ne restis tre longe en Cejl.

Al fraŭlino T. alportis la vortoj: »Tion mi jam scias«, dek semajnojn de esplora aresto. Ŝi diris ilin kiam oni sciigis per tamburo la grandan punindecon de rusaj flugfolioj. Ŝi legis pri tio en la gazeto kaj jam sciis tion. Sed la klerikaluloj trovis en tiuj vortoj ŝtatan perfidon — dirinte, ke ŝi certe havas similan flugfolion. La amikoj de sinjoro pastro venigis dekok atestantojn al procesa debato, sed tamen fraŭlino F. estis liberlasita. Sammaniere estis liberigita fraŭlino W. kiun la furioza venĝo de ĉefurbaj germanoj alkondukis por kelkaj tagoj malliberejon.

Unu tagon antaŭ mi estis liberlasita post dektri monatoj de esplorado la maldika mastrumino M. La falsa kulpigo el mortigo konfuzis la mizerulinon tiamaniere, ke ŝi pasigis plimulto de tiu tempo en frenezulejo.

Dum pentekosto alvenis tre afabla juna virino, kies belaj, bonaj okuloj montris belan kaj noblan animon. Ŝi estis anoncita kiel skribantino de anonima letero kiun oni ricevis en distrikta prefektéjo. Estis tuj klare ke ankaŭ tio estis faro de venĝo, same kiel en plej multo da okazoj kaj ŝi estis post kelkaj semajnoj liberlasita. Tre fiera pro sia scio bone germane paroli, estis virino, kiu venis malliberejon post la disputo kun domservistino. De mateno ĝis vespero ŝi trikis ŝtrumpojn por la inspektistino kaj rememoradis la hundojn kaj kanariojn, kiujn ŝi devis forlasi. Ŝi ne vivas kun sia edzo, kiu estas granda tirano, sed kune kun ŝi en la sama domo estas arestita ŝia nuna kunulo, kiu estas plej malmulte je dudek jaroj pli juna ol ŝi. El venĝo de la sama domservistino li estis tie. Kaj la okuloj de sinjorino brilas per ĝojo, se sukcesas al ŝi almenaŭ dum momento ekvidi lian vizaĝon.

La unuan de junio senpere post aŭdienco ĉe generalo, kiu komence de ĉiu monato vizitas malliberejon kaj demandas la petojn de politikaj esplorantulinoj, estis ankaŭ mi liberlasita kaj komence de oktobro la tuta afero favore por mi finita sen procesa debato.

Nun ĉio apartenas nur al estinteco. De tempo al tempo alportas al mi la leterportisto iun saluton aŭ rememoron de miaj estintaj kunloĝantinoj.

Kiom da ĝemoj kaj larmoj ekaŭskultis la silentemaj muroj de numero kvardek sep el novaj viktimoj, kiuj alternis tie de tiu tempo!

---

Hana Michalovicová:

## ŜUETO.

(Daŭrigo.)

»Kiu fraŭlino?« kaptante trunketon säme kiel dronanto.

»Sed tiu, ĉe kiu mia filino servas,« klarigis la maljuna virino. »Fraŭlino sendis hieraŭ siajn ŝuetojn por la riparo al la botisto kaj revenante hejmen, la knabino perdis ĝin.«

»Kiom multe mi ploregis!« certigis Tonjo.

»Fraŭlina moŝto dirus tute nenion al ŝi«, aŭdigis sin denove la maljunulino, »sed ŝia patrino certe ne pardonus Tonjon tiun perdiĝon.«

»La fraŭlino estas eble bonanima estulino?« ĝojigita mi demandis.

»Jes, kaj kiom multe!« atestis la knabino.

»Kaj bela?«

»Sinjoro«, ŝi estas bela kiel anĝelo!« ŝmacante per lango, klarigis la virino.

»Kiam vi devis alporti la ŝueton returnen?« daŭrigis mi la esploradon.

»Estas jam urĝa tempo,« ekĝemis la knabino, »mi devis esti jam longe hejme. La sinjorina moŝto certe riproĉos nin!«

»Kion fari nun? Ni iros simple kun vi, kaj al via estrino ni mem ĉion klarigos, por ke ŝi ne koleru je vi.«

La knabino ĝoje konsentis kaj nun ĉiuj tri ni ekmarŝis el la vilaĝo.

La vojo pasis sufiĉe rapide kaj daŭris nelonge, kiam ni eniris en la urbon! Tuj en la unua strato kondukis nin la knabino en la domon, supren en la unuan etaĵon, kaj ĉar ŝi havis ĉe si la ŝlosilojn de la loĝejo, mi mem malfermis la pordon, kaj kondukis nin en la salonon. La apartamento estis tre multekoste, kaj belguste aranĝita.

Daŭris ne longe, kaj venis la dommastrino mem, korpulenta, sed ankoraŭ bela virino kaj ridetante ŝi akceptis afable nian prezentiĝon. Tre detale ni rakontis al ŝi la tutan historion pri la trovinta ŝueto (mian juron komprenehle pro facile kompreneblaj kaŭzoj mi ellasis) kaj la sinjorino elkore ekridis.

»Mi estas devoligita al vi,« ŝi diris etendante ambaŭ manojn al la ŝueto.

Kiel do? Nun, senpere ĉe la celo de mia deziro, estas nuligota mia firma decido?

»Moŝto sinjorina,« mi balbutis, »vi opinios eble tion malsaĝa, sed mi firme decidiĝis transdoni la ŝueton propramane al ĝia posedantino.«

»Vi estas prava«, diris rideme, la sinjorino, »ĝi estas ja ŝia devo esprimi al vi la dankemon.«

Ŝi ekstaris, kaj foriris, por venigi sian filinon. Kiel senlima estis tiu momento, kun kia malpacienco mi rigardis la fatalan pordon en kiu estas aperonta tiu, kun kiu mi jam antaŭe svatiĝis! Sed ĉiu mia atendado estis superigita per realaĵo. Eniris dudekjara, ĉarmoplena knabino, gracia, aminda, kaj ridema, kaj etendis al ni senafekte siajn manetojn.

»Mi venas, por esprimi al vi mian plej sinceran dankemon sinjoroj,« ŝi diris, »ĉar vi redonis al mi miajn plej ŝatatajn ŝuetojn, en kiuj mi plej oportune dancas.«

»Ĝojo estas ĉe nia flanko,« mi aŭdigis min, ĉar kiu ne servus volonte al tia aminda fraŭlino?«

»Sed Alenka'n vi efektive ĝojigis, intermiksiĝis en la parolon la sinjorino, vi redonis al ŝi la ŝatatajn ŝuetojn, en la momento, kiam ŝi preparas sin al la dancado.«

»Fraŭlino iros eble hodiaŭ danci?«

»Sole en ne tre gravan amuzeton.«

Vorto donis vorton, kaj antaŭ ol ni estis foririntaj, ni havis jam permeson, aperi en tiu ne tre grava amuzvespereto, kaj la honoron, danci kun ĉarma Alenka. Senparole ni estis reveníntaj hejmen, kaj mi vestiĝis kiel eble plej elegante.

La vespereto sukcesis eksterordinare bone. Estis al mi permesate danci kun Alenka, premi ŝian maneton rigardi en ŝiajn okulojn, kaj revi pri la senfina feliĉo kaj plezurego de la bela amo.

Ĉio disvolviĝis tiel ĝojige, tiel nekredeble feliĉe, ke mi mem eĉ ne kredus tion, se tio ne estus realaĵo.

Ĝoja kaj feliĉa mi estis, kiam akompanante Alenka'n, ni estis revenantaj al la hejmo. Ni paŝis silente unu apud la alia. Meditante pri ĉio ebla, mi ridetis senĉese pro la granda feliĉo, kiu tute ekregis miu. Fortega ekskuo per kiu estis min regalinta mia amiko, min rekonsciiĝis. La amiko tenis mian brakon tiel forte, kiel en la premilo, kaj liaj okuloj anoncis malbonsignajn rigardojn.

»Aŭskultu kaj bone fiksu en vian memoron vorton post vorto kiujn mi nun diros al vi.«

Grincante per dentoj, li ekkriis: »Se vi kuraĝos ankoraŭ nur unu fojon alproksimiĝi al bela Alenka, mi elpuŝos al vi ĉiujn dentojn, kaj rompos ambaŭ krurojn! Kaj rigardis min tiel minace, kaj ekkaptis min tiel forte, ke ŝajnis esti jam lasta momento de mia vivo, kaj liaj sovaĝaj rigardoj, kiuj atestis lion firman decidon, kaj necedeman volon, devigis min ekceli hejmen.

Alproksimiĝi al Alenka mi ne kuraĝis plu, kaj mia amiko konservis pri tio absolutan sekreton. Pli poste, por ke la ironio estu pli kompleta, la amiko invitis min al edziĝa festo. Kaj por ke mi ĝuu tamen almenaŭ parton de ilia feliĉo, oni konfidis al mi la oficon de baptopatro por la unuenaskita filo de mia amiko kaj Alenka.

Kaj nun, kion vi diras pri tio? La mano sur la koron kaj diru, ĉu mi havas feliĉon, aŭ ĉu vi kredas jam mian senĉesan malsukceson?

Tradukis Emanuel Kubásek.

---

KAREL HORKÝ:

## ERARO DE L'AMO.

Sur la benketo apud Rudolfinum*) sidis juna, bela kudristino kun negliĝe vestita junulo, kiu arogante rigardis antaŭen per lacigitaj okuloj. Ĝi estis sendube kelnero, kiu ie diboĉis dum lasta nokto. Kaj ŝi sidis kun kapo apogita je la manoj, rigardis malsupren kaj singulte ploris. Mi eksidis apude kaj ekkomprenis, ke la diboĉulo rifuzas ŝian amon... Subita doloro okupis min kaj mi arde eksopiris helpi al tiu bela kompatinda knabino, kiu ne komprenis la vivon. La suno lumis, rivero bruis tra baraĵoj, siringoj en parko vekis novajn sopirojn kaj invitis al novaj ĝojoj — kaj ŝi, naiva knabino, ploris tie maldolĉe, ĉar ebriulo kun lacigitaj okuloj ne konsciis, ke ŝi volas enplanti en mizeran ruinon de lia vireco la rozon. Dum tiu momento mi mem volente kun fervora amo estus karesinta tiun knabinon, ĉar nenio estas pli tragedia ol kiam malriĉaj homoj, kiuj krom la amo posedas tute nenion, eĉ en la amo eraras.

Trad. Arĥ. C. Nebuška.

---

*) pinakoteko en Praha.

## DIVERSAĴOJ.

Nia memortago. La 15. de dec. forpasis 59 jaroj de la naskiĝo de dro. L. L. Zamenhof. Tiun ĉi daton ni ne memoras nur por festi la nomon de nia mortinta gvidanto, sed per niaj linioj ni ankaŭ volas memori la senkomparan laboron de nia geniulo por la modlingva ideo. Kaj jen ni demandas vin: Ĉu ankaŭ vi, membro de esperantista movado, faras vian moralan devon, devon de progresema homo, vastigi la scion pri la lingvo internacia? La memortago de Zamenhof devas instigi Vin al pli intensa laboro por Esperanto!

So. kolonelo Husák, la fama gvidanto de ĉeĥoslovakaj legionoj en francujo, kiu antaŭ ne longe revenis en Praha kaj estis tie tre solene kaj sincere akceptita, ĉar li estas unu el niaj herooj kreintaj la bohemslovakan memstaron, estas nia samideano. Antaŭ la milito li estis fervora membro de Esperantista klubo en Čes. Budějovice. Per ĉi tiu samideano-heroo povas prave fieriĝi nia movado.

La ministerio por instruado en nia ŝtato preparas gravajn reformojn en la lerneja sistemo. Interalie oni ankaŭ reformos la disciplinan reguIaron por lernejoj laŭ modelo de demokrataj ŝtatoj. Por tiu celo ni estis petitaj prizorgi al la ministerio disciplinajn regularojn de francaj, anglaj, nordamerikaj, svisaj kaj holandaj lernejoj. En tiu ĉi afero ni turnis nin al la Centra oficejo de U. E. A. en Ĝenevo, kiu jam respondis, ke ĝi tuj entreprenis la necesajn rilatojn.

Nia cenzuro. Antaŭ unu jaro, kiam ni anoncis al la ankoraŭ aŭstria Distrikta oficejo la intencon eldonadi la Progreson, oni ordonis al ni al cenzuro prezenti ne nur la gazeton, sed eĉ bohemlingvan tradukon de ĝia teksto, por kies ĝusteco garantias la responda redaktoro. Nun, en nia memstara demokrata respubliko, ni sendis al la cenzurejo la gazeton sen traduko, sed so. censuristo tuj al ni telefonis, ke ni devas almeti la tradukon, ĉar li esperante ne komprenas. Ni rifuzis plenumi ĉi tiun postulon malindan de demokrata ŝtato, klarigante, ke ĝi kaŭzas al ni grandan tute senutilan laboron, kaj ke per simila cenzurmaniero estus al ni jam en la komenco malebligita la eldonado de esperantaj libroj aŭ de pli gravaj verkoj. Pri tiu ĉi afero estis sciigita la Landa politika oficejo (landestrejo), de kie ni nun atendas decidon, kiu sendube estos por ni favora.

La signifo de esperantismo en la kultura evolucio, estas la titolo de la artikolo, kiun jam antaŭ 9 jaroj skribis la universitata profesoro dro. Fr. Krejčí por la 3. jarkolekto de Český esperantista*) (en traduko de H. K. Bouška). Per tiu artikolo Krejčí, la unua inter bohemaj scienculoj, publike — ne nur en privata interparolo — esprimis sian favoron al esperantismo. — Kiu lin sekvos nun en en nia libera respubliko, kaj kiu ankaŭ kunhelpos?

H.

*) Ricevebla ĉe librejo Springer, Praha II., Jilská ul.

Sciigo. So. Otto Sklenička, bankoficisto kaj deleg. de U. E. A. en Hradec Král. komunikas al siaj geamikoj, ke li feliĉe revenis el la terura mondmilito al sia civila profesio. Oni uzu lian malnovan adreson (Živnobanka).

Deziro. So. Svitberto J. Degenkamp, del. de U. E. A. el Utreĥt, Betlehemweg 36. (Nederlando) deziras interŝanĝi ilustritajn kartojn kun bildoj de preĝejoj. Li ĉiam respondos.

So. JUC. Karel Fiala, Praha II., Jenštejnská ul. 1. deziras korespondi kun ĉiuj landoj per leteroj kaj il. poŝtkartoj.

Kiu helpos? So. Jaroslav Kolena, komercisto el Plzeň entreprenis en februaro 1914. komercan vojaĝon el Hamburg per la ŝipo »S. S. Albeuga« Carlowitz & Comp. Dum eksplodo de la milito li estis revenanta el Vladivostok tra Tokio (Japanl.) kaj en Shanghai (Ĥinujo) li estis kun la ŝipo internigita. De tie li lastfoje skribis la 15. febr. 1916. kaj laŭ la sciigo li provis per amerika ŝipo forkuri tra San Francisko. — La familio de suprenomita sinjoro turnis sin al ni, petante nian helpon. Ni transdonas ĉi tiun aferon al soj. del. de U. E. A. petante plej zorgan serĉadon en la priskribita direkto kaj ni garantias, ke ĉiuj elspezoj estos pagitaj de la familio.

## KRONIKO.

Praha. Fraŭlina rondeto aranĝis la 12. de nov. intiman vespereton por festi la konstituiĝon de la Bohema respubliko. Fino. Šupichová parolis »Pri la devo de esperantistoj en la nova ŝtato.« Poste deklamis fino. Dlouhá poemon de Neruda: »Jen dál.« La ĉeestantinoj promesis labori por Esperanto. — La 18. de nov. vizitis la Rondeton so. subleŭtenanto M. Lukáš el Jilemnice, kiu tre bele rakontis pri siaj esp. travivaĵoj dum la militservo. La sama vizitis son. majoron Fierlinger, ankaŭ samideanon, la delegiton de Bohem-slovakaj legioj, tiutempe troviĝantan en Praha, kaj esprimis al la kara gasto niajn salutojn, kiujn so. majoro kore ripetis, bedaŭrante, ke li ne povas partopreni la kunvenojn de la Rondeto. — Virina kurso por komencantinoj estos aranĝita post Kristnasko de fino. Jul. Šupichová (Praha II., Malá Štěpánská 6). — Al la skriba kurso, kiun la suprenomita fraŭlino aranĝas en la porjunulara gazeto Malý Čtenář, aliĝis ĝis la 6. t. m. 170 personoj. — Esperanta flago (laboro de Fraŭlina rondeto) flirtas sur la domo de kafeio »Union« (Ferdinandova tř.). En la sama kafejo troviĝas oficejo por informa servo al esperantistoj, kie ĉiutage oficas fino. Moudrá de 2—7 h. postt. — Bohema societo esp. regule kunvenas ĉiumarde pos la 8. vesp. en la restoracio ĉe Hoza, Celetná ul. La 22. X. estis en la komitata kunveno priparolita realigebla programo por vintraj monatoj de t. j. La 5. XI., en la kunveno por festi 60an naskiĝjaron de boh. filozofo, univ. prof. dro. Fr. Krejčí, unu el la honoraj prezidintoj de la Krakova kongreso, parolis prof. dro. Kamaryt pri lia filozofio. So. Hromada menciis, ke la kunveno estas la unua, kiun la boh. esperantistoj partoprenas kiel liberaj civitanoj de sendependa ĉeĥoslovaka ŝtato, kaj citis poste la

artikolon de prof. Krejčí: Pri la signifo de esperantismo en la kultura evolucio. Fino. Šupichová proponis aranĝon, rilate la esperatan venon de fremdaj esperantistoj en la urbon. — La 12. XI. partoprenis la kunvenon so. subkolonelo Brich. — La kunvenon de 19. XI. partoprenis la unuaj revenintoj el batalkampo: prof. Pitlík, R. Šáda, red. de la Kulturo, kaj. M. Lukáš, kiu rakontis pri siaj spertoj pri Esperanto dum la milito. So. Lukáš recitis bone sukcesintan tradukon de poemo Harut kaj Marut de J. Vrchlický. — La 8. de nov. vizitis son. Kraus, deleg. de U. E. A. itala leut. so. Enrico Violi, kiu trapasis Praha-n dumvoje al Mladá Boleslav. — Biblioteko de Boh. soc. esp. enhavas 150 volumojn. Jara kotizo societa estas 2 K. Prahanoj aliĝu! — Bohema Asocio Esp. proponis siajn servojn al Národní výbor, kiu antaŭ la konstituiĝo de la Nacia reprezentantaro formis nacian regantaron.

P l z e ň. Esperantista klubo kunvenas de nun ĉiusabate en sia luksa klubejo en hotelo Svoboda (Plzeň I., Perlová ul.). La XIV. jara ĝenerala kunveno de la klubo okazos la 25. jan. 1919. en la kluba kunvenejo. La kluba komitato decidiĝis malfermi propran kancelarion, kie ankaŭ troviĝos la redakcio de La Progreso. — La kurson de so. J. Pech en Lidová škola de soc. dem. partio partoprenas 38 personoj.

D o u d l e v c e ap. P l z e ň. La esp. kurson, kiun aranĝas la loka s. dem. organizaĵo partoprenas 82 personoj. Kotizo de la kurso estas 8 K, enskribo 3 K. El la kolektita monsumo oni difinis 300 K por la fondota esp. societo. Ankaŭ tie ĉi instruas so. Pech.

D o u b r a v k a ap. P l z e ň. Esperantistoj rekomencis siajn kunvenojn kaj aranĝos kurson.

Ĉu en la aliaj lokoj nia esperantismo dormas?

---

Jan Amos Komenský:

## KIEL NI LEGU.

Librojn ne sufiĉas sole legi; atente ili estas legotaj, por ke la plej bonaj partioj estu notitaj kaj elskribitaj; notitaj en la libro mem, se ĝi estas via; elskribitaj, ĉu la libro estas via aŭ fremda. Elprenadi partojn plej utilajn estas afero absolute bezona, tiel, ke neniu legas librojn kun profito, kiu el ili samtempe ne eltiradas, ĉar ne la libroj igas vin klera, sed la studado de ili. Tio sole estas frukto de la legado, por ke tiu, kiu ion legas, ĝin al si propriĝu per elskribado, ĉar nur tion la atenton de la leganto spritigas, la spiriton en atenteco konservas, ne rimarkitajn aferojn en la memoron enigas kaj la spiriton senĉese per pli kaj pli granda lumo surverŝas.

Trad. »Fraŭlina rondeto« en Praha.

## UNIVERSALA KORA NOBELECO.

Internacia ligo de progresemaj homoj.

Centra oficejo de U. K. N. petas la delegitojn elekti por la Centra komitato 10 komitatmembrojn kaj tri anstataŭantojn por la daŭro de 3 jaroj. Ĉiu delegito havas tiom da voĉoj, kiom da liganoj estas en lia regiono. La elekto estas koresponda. La kontrolo de la voĉdoniloj okazos ĉe la centra oficejo antaŭ 2 membroj de la regiono, kie estas la sidejo de la Centra oficejo (adr.: Jaro Železný, Plánice, Bohemujo). La ligo eldonos sian oficialan adresaron por la jaro 1919, kiu enhavos krom la adresoj de la liganoj ankaŭ adresojn de korespondemaj esperantistoj kun detala cito de specialaj deziroj (temo de korespondado, ĉu per leteroj aŭ poŝtkartoj, kion ili deziras interŝanĝi ktp.). Al la petoj pri enskribo oni aldonu 3 intern. respondkuponojn (30 Sd.). Al ĉiu aliĝinto estos la adresaro sendita tuj post ĝia apero afrankite. Oni ĉion adresu al: Jaro Železný, Plánice, Boh.

---

## BIBLIOGRAFIO.

Ŝajnas, ke la esperantismo, dormanta dum la daŭro de la milito, per sia longdaŭra dormo kolektis tiom da novaj fortoj, ke ĝi rapide akiros tion, kion ĝi perdis per la milito. La monda tragedio ne estas ankoraŭ finita, sed inter la esperantistoj komencas jam vigla laboro. La lando, kiu per sia vigla poresperanta laboro ĉefe meritas la atenton de la internacia esperantistaro estas Nederlando, kie en la lastaj monatoj aperis preskaŭ samtempe du novaj esp. gazetoj: L a E s t o n t o, monata beletria gazeto por progresama junularo, kun tute esp. teksto, kiu jam per sia aspekto sin rekomendas. Ankaŭ la artikoloj en ĝi enhavitaj estas interesaj kaj skribitaj en bona esperanto. La Estonto estas 12 paĝa, 14×22 cm. kaj kostas jare 2 Sm. (2.50 hol. guld.) Ĝia adreso: Anth. C. Bakels. — Postbox: Haarlem (Holland). — La alia gazeto estas nomata »N e d e r l a n d - E s p e r a n t o«, kaj per sia pligrandparte holandlingva teksto ĝi estas gazeto propaganda, ĝi aperas semajne 4 pĝ. 16×25 cm. kaj kostas kvaronjare 0.35 hol. guld. Redakcio kaj admin. J. L. Bruin, Paul Krugerlaan 37, Haag.

D a s W e l t s p r a c h e n p r o b l e m Esp. u. d i e S t e l l u n g d e r k a t h. K i r c h e z u r W e l t s p r a c h e n f r a g e (kun aldono Esperanto im Krige) estas la nomo de la broŝuro eldonita de la Grupo en Krems a. D. de la Aŭstria katolika ligo esp. kaj. verkita de Piarista provincialo P. Fr. Meŝtan. Ĝi enhavas 32 pĝ. 11×17 cm. kaj kostas 70 hel. Ĉi tiun verketon ni tralegis kun intereso; ĝi parolas ne nur pri la mondlingva problemo kaj ĝia solvo Esperanto, sed ankaŭ pri la rilato de katolika eklezio al ĝi. La aŭtoro en sia verketo refutas per bona logikeco la oponaĵojn de kelkaj katolikaj rondoj kontraŭ Esp. kaj parolas pri ĝia uzado kaj propagando inter la katolikoj. La verketo de P. Fr. Meŝtan sendube multe helpos al la propagando Esp. inter la katolikaro kaj tial ni ĝin rekomendas al ĉiu germane parolanta katoliko. B. T.

J. Šupichová:

## ANGULETO POR KOMENCANTOJ.

5a fragmento.

El parolado de Dro. L. Zamenhof en la IVa kongreso en Dresden 1908:

»Nia lingvo mem konstante pliriĉiĝas kaj elastiĝas. Iom post iom konstante aperas novaj vortoj kaj formoj, unuj fortikiĝas, aliaj ĉesas esti uzataj. Ĉio fariĝas kviete, senskue kaj eĉ nerimarkeble. Nenie montriĝas ia diferenciĝado de nia lingvo laŭ la diversaj landoj, kaj ju pli spertaj fariĝas la aŭtoroj, des pli similiĝas reciproke ilia uzado de nia lingvo, malgraŭ la granda malproksimeco de ilaj lokoj de loĝado. Nenie rompiĝas aŭ difektiĝas la kontinueco inter la lingvo malnova kaj nova, kaj malgraŭ la fakto, ke nia lingvo forte disvolviĝas, ĉiu nova Esperantisto legas la verkojn de antaŭ dudek jaroj kun tia sama perfekta facileco, kiel Esperantisto tiutempa, kaj li eĉ ne rimarkas, ke tiuj verkoj estas skribitaj ne nun, sed en la unua, suĉinfana periodo de nia lingvo..«

**Rozbor. — Analizo.**

Ĉ e s i = přestati, ustati. — La pluvo ĉesis. = Dešť ustal. — D i f e r e n c o = rozdíl. — La diferenco inter li kaj vi estas granda. = Rozdíl mezi ním a tebou je veliký. — D i f e k t i = poškoditi. — Ne difektu la maŝinon! = Nepokazte stroje! — F o r t i k a = trvanlivý, vytrvalý, důkladný. — Fortika drapo, muro = trvanlivé sukno, důkladná zeď. — K o n t i n u e c o = ustavičnost, nepřetržitost. — K v i e t a = mírný, klidný, tichý. — Li estas kvieta, ne pasia. = On je mírný, ne vášnivý. — M a l g r a ŭ = přes (co), vzdor tomu. Vi faris tien malagraŭ malpermeso. = Učinil jsi to vzdor zákazu. — R e c i p r o k a = vzájemný. — Ni helpu nin reciproke! = Pomáhejme si navzájem! — R o m p i = lámati. — La poto rompiĝis. = Hrnec se rozbil. — Ne interrompu min! = Nepřerušuj mne! — S k u i = třásti, třepati, vrtěti (hlavou). — Li ekskuiĝis. = Zachvěl se. — V o l v i = vinouti, ovíjeti. — Envolviĝu! — Zahalte se (něčím)!

**Traduko.**

V i n a r b e t o. Ĝardenisto havis apud sia domo vinarbeton. Ĉiujare ĝi donis bongustajn vinberarojn. La najbaro enviis lin pro tio. Nokte li detranĉis kelke da plej longaj vergoj de la vinarbeto. Tio ĉi tre malĝojigis la ĝardeniston. Tiam oni ankoraŭ ne sciis, kiom utila estas la maldensiĝado por la vinarbeto. Sekvantan jaron ĝi estis tiom fruktoriĉa, kiom ankoraŭ nemiam pli frue.

## GERMANO PRI BOHEMA NACIO.

Famega muzikdirigento Felix Mottl, kiu ne kaŝis sian admiron al bohema muzikarto, nominte B. Smetana, mian muzikverkiston de »Vendita fianĉino« unu el la plej grandaj muzikdramaŭtoroj, diris iam en interparolado kun iu viena ĵurnalisto: »Mi taksas nacionojn laŭ ilia muziko. Por mi estas Bohemoj eminenta nacio. Vidu nur, kian taskon ili jam plenumis en la muziko. Kaj konsideru, ke la alaŭdo alie kantas en libereco ol en la kaĝo. Bohemojn tamen premas perfekta korseto! Ni ekmirus, kion la Bohemoj montrus al la mondo, se ili havus memstarecon.« Kaj kiam mirigita ĵurnalisto al Mottl deklaris, ke lia sentenco estas herezo, respondis Mottl vive: »Tion ne diras mi mem, Richard Wagner ĝin antaŭ mi multfoje eldiris, kaj ĉiu instruita Germano tion jam scias, li nur tion ne volas konfesi.« Kompreneble tio kaŭzis inter germanaj nacionalistoj grandan ekscitiĝon. Esper. Em. Batěk.

Hana Kvapilová:

Ĉiu malfeliĉo de la pliposta vivo ne ombrigos kvietan belecon de rememorado je la juneco, eĉ la plej granda doloro ne kovros ĝin tute per sia nubo. Patrina amo kaj delikateco, benantaj manoj de la patro, varmeco de nia hejmo kantas ardan kanton, plenan da sindonemeco kaj konsolo en dolorigaj momentoj, kiuj neniun en la vivo maltrafas. Feliĉa, kiu tiun kanton aŭdis — pli feliĉa, kiu sciis ĝin en la koro konservi kaj trankviligi per ĝi la animon!

Trad. »Fraŭlina rondeto« en Praha.

Č. Pozdník:

## TERURA ŜANĜO.

Fame konata itala pentristo Leonardo da Vinci pentris sian faman bildon »Vespermaĝo de Sinjoro« sur la muro de la manĝejo en la estinta monaĥejo en Milano. La bildo, ĝis hodiaŭ konservita, kvankam jam multe difektita, estis finpentrita preskaŭ post kvarjara laboro en la jaro 1498a. Je tiu ĉi bildo aliĝas interesa historio:

Kiel modelon de Kristo elserĉis Leonardo kantiston en ĥorejo de iu roma preĝejo, nomatan Pietro Brandelli, kies vizaĝo estis tre ĉarma kaj karakteriziĝis per nobleco. Dume forpasis jaroj, figuro post figuro aperiĝis sur la muro, sed la bildo ankoraŭ ne estis finpentrita. Mankis Judaso. Leonardo vane serĉis viron, taŭgan esti modelo. Fine li trovis lin. Li estis almozpetanto, kies vizaĝo vidigis signon de la senmoraleco kaj malindeco. Li sekvis volonte la majstron, ĉar sidi kiel modelo estas bela kaj facila mongajno. Sed la peniko elfaladas el la manoj de la pentristo... Kia terura supozo? Ĉu tio tamen estus ebla? Tie ĉi de la bildo rigardas lin en bela, delikata vizaĝo de la Sinjoro la portreto de tiu, kiu nun sidas tie kiel modelo de evi-

tindulo de la homaro, de Judaso. Kaj tio estis vere li. Pietro Brandelli, la iama preĝeja kantisto. Pere de drinkado kaj kartludado li tiom senhonoriĝis, ke li estis eternigita sur la bildo duanfojon, kiel Judaso, modelo de la malindeco.

Trad. »Fraŭlina rondeto« en Praha.

## DE LA ADMINISTRACIO.

Per tiu ĉi numero finiĝas nia unua jarkolekto. Ĉe tiu okazo ni esprimas nian dankon al ĉiuj, kiuj helpis al ni en nia laboro, kiu certe ne estis facila. Jam kolektado de adresoj de esperantistoj ne estis post preskaŭ kvarjara daŭro de la milito facila laboro, se oni konsideras, ke ni devis prizorgi tiom da abonantoj al La Progreso, ke ĝia daŭra aperado estu sen monoferoj garantiita. Kaj en tiu ĉi fundamenta kondiĉo ni tute kontentige sukcesis; tial ni sincere dankas al ĉiuj amikoj, kiuj helpis al ni per sendo de adresoj aŭ per rekomendado de nia gazeto al siaj konatoj. Ilia vico estas tiel longa, ke ni ne povas ĉiujn nomi. Tamen ni sentas la devon citi tie ĉi la nomon: de so. J. Pech el Plzeň, kiu akiris al La Progreso preskaŭ cent abonantojn, fino. Heda Vlčková, kiu aranĝis la adresaron, kaj geedzoj Marie Kubásková kaj Em. Kubásek, kiuj faris gravajn laborojn administraciajn eĉ redakciajn tute senpage. Al ĉiuj niaj helpantoj ni esprimas sinceran dankon!

Por la administracio: Fr. Kavan.

## DE LA REDAKCIO.

Ankaŭ ni sentas la devon esprimi nian dankon ne nur al niaj konstantaj kunlaborantoj, sed eĉ al ĉiuj aŭtoroj de unopaj artikoloj enpresitaj aŭ enpresotaj, kiuj helpis al ni pliriĉigi la enhavon de nia gazeto. Ni scias, ke ilian kunlaboron kaŭzis la sincera deziro helpi ĉu al La Progreso, ĉu al la esperantismo, kaj tial en la spirito ni kore premas iliajn manojn, kaj petante ilian pluan helpon, ni ĝojas je revido en la nova, por nia afero certe pli feliĉa jaro.

La redakcio.

## ATENTIGO.

La estro de nia presejo komunikis al ni, ke kaŭze de la interkonsento de presejposedantoj en Bohemujo pri la plialtigo de la prezoj, kostos ankaŭ la presado de La Progreso pli multe ol ĝis nun. Malgraŭ tio, ke la financa gajno de nia entrepreno estis en la nuna jaro tute kontentiga, devis la eldonantaro plialtigi la jarabonon de la Progreso por la jaro 1919 je K 6.—. Ni scias, ke tiu ĉi plialtigo ne estas agrabla al niaj ĝisnunaj abonantoj, tamen ni esperas, ke ili konservos al ni sian favoron eĉ en la venonta jaro.

La eldonantaro de La Progreso.

## KVITANCO.

La aperadon de La Progreso ebligis jenaj ŝoj: (Fino) Inc. Gross 20 K, B. Tittl 30 K, J. Pavlík 20 K, A. Loukota 20 K, Fr. Kavan 30 K (ĉiuj el Plzeň). La listo de la akciuloj estas per tiu ĉi kvitanco fermita! — Por subteni La Progreson pagis al ni jenaj gesoj: MUDr. Pivoňka, Plzeň 6 K, P. K. Kučera, Kladruby K 5.50, J. Podlipský, Smíchov 50 K, Maryško, Jablonec 10 K, JUC. Siebenschein, Wien K 5.50, A. Havel, Odessa K 5.50, JUDr. Fousek, Beroun K 5.50, Bož. Veselá, Libšice 10 K, P. Balkanyi, Budapest 10 K, Em. Batěk, Říčany 20 K, Rakusz Jul. K 5.50, O. Sklenčka, Hradec Král. K 5.50, Nina kaj M. Silberstekenovy, Praha 50 K.


**BOHEMA ESPERANTO-SERVO**

(inĝ. L. Berger)

Moravany apud Pardubice, Bohemujo.

Ĝi peras korespondadon, informas pri esp. movado, pri bohema nacio, prizorgas kaj korektas tradukojn, aranĝas paroladojn, kursojn, instruas persone eĉ skribe, vendas esperantajn librojn, glumarkojn, signojn, Mateon.

**MATEO,**

alie nomata paragvaja teo estas la sola efektive valora anstataŭaĵo por kafo kaj ĥina teo. Ĝi enhavas 1% da kofeino, efikas refreŝiĝe eĉ kurace. Pura naturaĵo antaŭ la milito rekte importata el Ameriko pere de Esperanto.

**Tre taŭga por ĉiutaga trinkado.**

Paketojn po 3.— K poŝte ĉien ekspedas kaj pli detalajn klarigojn donas

**BOHEMA ESPERANTO-SERVO**

(inž. L. Berger), Moravany, Bohemujo.


Eldonanto: Esperantista klubo en Plzeň. — Responda redaktoro: B. Tittl, Plzeň, Radyňská ul. Presis: Laborista presejo, Plzeň.